



(La suba teksto estas traduko de la informoj donitaj en la retpaĝo <http://www.ts-adyar.org/content/helena-petrovna-blavatsky-1831-1891>)

Helena Petrovna Blavatsky (1832-1891)

Helena Petrovna Blavatsky (1831-91) estis eble la plej granda okultisto de la Okcidento lasttempe, kaj elstara diskonigantino, kiu prezentis la Antikvan Saĝon al la moderna erao. Kun malmulte da reklama bruo ŝi alportis potencajn influojn sur homajn aferojn, kiel estas ekzemplita en ŝia vivo kaj verkoj. Ŝi alportis nenion novan al la homaro; fakte ŝi sukcesis je la granda tasko komuniki Saĝecon, kiu estas tiel malnova kiel la homaro. Ŝiaj atingoj estis duoblaj: ŝi fondis kune kun eminenta usonano, H. S. Olcott, la Teozofian Societon en 1875 kaj ŝi skribis ampleksege spiritan kaj okultan literaturon, kiu prave konatigis ŝin kiel “la Alportantino de Lumo”.

Fruaj Tagoj

Helena Petrovna von Hahn naskiĝis en Ekaterinoslav en Suda Rusujo la 12-an de aŭgusto de 1831. Idino de rusa aristokrata familio, ekde ŝia frua infanaĝo ŝi montris rimarkindan psikan aktivecon, artajn kaj literaturajn talentojn kaj intelektajn atingojn. Ŝiaj psikaj povoj perpleksigis ŝian familion kaj amikojn. Ŝi estis lingvistino, talenta pianistino kaj artistino, sed ankaŭ sentima rajdantino de duonsovaĝaj ĉevaloj, kaj ĉiam en proksima kontakto kun la naturo. Kiam ŝi estis preskaŭ 18-jaraĝa, ŝi edziniĝis, sed nur por fariĝi sendependa de siaj gepatroj. La geedzeco en si mem signifis nenion por ŝi kaj neniam estis plenumita. Post kelkaj monatoj ŝi eskapis kaj vojaĝis vaste en Turkujo, Egiptujo kaj Grekujo, kun mono provizita de ŝia patro. En 1851, estante en Londono, ŝi renkontis la individuon, kiun ŝi estis ekkoninta en siaj infanaĝaj psiko-spiritaj vizioj - orientan Iniciton de raĝputa¹ naskiĝo. Li parolis iomete pri la laboro, kiu estis projektita por ŝi, kaj ekde tiu momento ŝi akceptis plene lian gvidon.

La vojaĝoj de H.P.B. ĝis 1873

En 1851, H.P.B. (kiel ŝi estas konata) enŝipiĝis al Kanado, kaj post aventurplenaj vojaĝoj en diversaj partoj de Usono, Meksiko, Sud-Ameriko kaj Antiloj, ŝi iris en 1852 tra Kabo de Bona

¹ Raĝput (de la sanskrita *raja-puta*, reĝido) estas membro de klano vivanta en centra, okcidenta kaj norda Hindujo (Barato) kaj orienta Pakistano. La Raĝputoj estas menciitaj en la vikipedia artikolo pri Raĝastano.

Espero kaj Cejlono (nun Sri-Lanko) al Hindujo. Ŝia unua provo eniri Tibeton malsukcesis. En 1853 ŝi revenis al Anglujo tra Javo, kaj en 1854 vojaĝis al Usono. En 1855 kaj en 1868 ŝi sukcesis eniri Tibeton kaj ricevis okultan trejnadon per siaj Instruantoj. En 1858 ŝi estis en Francujo kaj Germanujo, kaj poste revenis al Rusujo. De 1860 al 1865, ŝi loĝis en kaj vojaĝis tra la Kaŭkazo, kaj spertis severan fizikan kaj psikan krizon, dum kiu ŝi gajnis kompletan kontrolon super siaj okultaj povoj. Ŝi forlasis Rusujon en 1865 kaj vojaĝis vaste tra la balkana regiono, Grekujo, Egiptujo, Sirio, Italujo kaj pluraj aliaj landoj. En 1870 ŝi estis denove en Kipro kaj Grekujo. Poste, en Egiptujo, ŝi provis formi Spiritan Societon, kiu baldaŭ malsukcesis. En la printempo de 1873 Helena estis instruciita de sia Majstro iri al Parizo kaj al Novjorko, kie ŝi alteriĝis la 7-an de julio de 1873.

La tasko de H.P.B.

Ekde 1873 H.P.B. posedis kaj regis siajn multajn kaj tute nekutimajn spiritajn kaj okultajn povojn. Ŝi estis konsiderita kiel la plej bona havebla instrumento por la laboro, kiun ŝiaj Instruantoj planis, nome proponi al la mondo novan prezenton, kvankam nur en mallonga skizo, de la malnova *Theosophia* [Teozofio], “La amasigita Saĝeco de la eraoj, testita kaj kontrolita de generacioj de Viziuloj. . . tiu tuteco de la Vero, de kiu la religioj, grandaj kaj malgrandaj, estas nur kvazaŭ branĉoj de gepatra arbo.”

La spiritisma movado tiam inundanta Usonon estis granda defio al ŝia laboro. Helena deklaris: “Mi estis sendita por pruvi la fenomenojn kaj ilian realecon, kaj montri la eraron de la spiritisma teorio de spiritoj.” Neniu racia eksplikoj de la mediumaj kaj rilataj fenomenoj nomitaj “Spiritismo” estis donita antaŭe. Scienca materiismo minacis detru la kredon je - kaj serĉon de - spiritaj realoj. H.P.B. iris al Chittenden, Vermont, Usono, kie Kolonelo H. S. Olcott enketis pri mediumaj fenomenoj ĉe la Bieno Eddy kaj publikigis la rezultojn en gravaj gazetoj. Ŝi pruvis, ke ŝi mem povis produkti la fenomenojn kaj proponis ilian realan eksplikon. Ŝi skribis kelkajn fortajn kaj brilajn artikolojn por gazetoj kaj revuoj, defendante tiun “veran spiritismon” kaj elmontrante fraŭdantajn mediumojn.

La Teozofia Societo estas formata

La 7-an de septembro de 1875 H.P.B., Kolonelo Olcott kaj W. Q. Judge, kune kun pluraj aliaj, formis societon, kiun ili nomis La Teozofian Societon, por publikigi la antikvajn instruojn de Teozofio, aŭ Dia Saĝeco, kiu estis estinta la spirita bazo de aliaj grandaj movadoj de la pasinteco, kiel Novplatonismo, Gnostikismo kaj la misterecaj religioj de la klasika mondo. La Inaŭgura Alparolado de la Prezidanto-Fondinto, Kolonelo Olcott, estis farita la 17-an de novembro de 1875, la oficiala dato de la fondo de la Societo. Komencinte per ĝenerala deklaro de celoj, la Fondintoj baldaŭ esprimis ilin pli specife en tio, kion ni konas kiel la Tri Celoj de la Teozofia Societo.

Izisa Senvualita

En septembro de 1877 la publikigo de la unua monumenta verko de H.P.B., *Isis Unveiled* [Izisa Senvualita], faris grandegan impreson sur la legantan kaj pensantan publikon. Ĝi estis konsiderata kiel unu el la “rimarkindaj produktaĵoj de la jarcento”. *Isis Unveiled* skizas la historion, amplekson kaj disvolviĝon de la Okultaj Sciencoj, la naturon kaj originon de magio, la radikojn de Kristanismo, la erarojn de la kristana teologio kaj de la establitaj ortodoksaj sciencoj, sur la fono de la sekretaj instruoj, kiuj kuras kiel ora fadeno tra pasintaj jarcentoj, venantaj al la surfaco fojfoje en diversaj mistikaj movadoj.

H.P.B. en Hindujo

En 1879 H.P.B. kaj Kolonelo Olcott alvenis al Bombajo (nun Mumbajo), Hindujo. Baldaŭ post alteriĝo, ili estis kontaktitaj de S-ro Alfred Percy Sinnett, redaktoro de la angla-hinda gazeto *The Pioneer* [La Pioniro], de Allahabado. Tiu kontakto baldaŭ montriĝis gravega. H.P.B. rekomencis sian literaturan laboron en Mumbajo. Ŝi skribis artikolojn kaj publikigis ilin en kelkaj eŭropaj ĵurnaloj, krom kelkaj en Hindujo. Tamen, la fondo de ĉiumonata revuo, *The Theosophist* [La Teozofisto] (eldonita ĝis hodiaŭ), dediĉita al orienta filozofio, arto kaj okultismo, ampleksanta mesmerismon, spiritismon kaj alian sekretajn sciencojn, donis al H.P.B. la oportunon transdoni sian mesaĝon sen malhelpo. La artikoloj, kiujn ŝi skribis por tiu revuo de 1879 ĝis 1887, estis republikigitaj en la serio *Collected Writings* [Kolektitaj Skribaĵoj].

La Sekreta Doktrino

En majo de 1882 estis aĉetita vasta bieno en Adyar, proksime de Madraso (nun Ĉenajo), kaj la Sidejo de la Teozofia Societo translokiĝis tien ĉe la jarfino. Tiu centro baldaŭ fariĝis la elradianta punkto por tutmonda agado. En 1884 Kolonelo Olcott forveturis al Londono por fari peton al la brita registaro nome de la budhistoj de Cejlono. H.P.B., kiu tiam estis relative malsana, iris kun li al Eŭropo. Ekde la aŭtuno de 1884 H.P.B. estis plene okupita skribi sian duan verkon, *La Sekreta Doktrino*, kiu estis kompletigita kaj eldonita en du grandaj volumoj en oktobro-decembro de 1888. La tria volumo estis publikigita postmorte. Ŝiaj nelacigeblaj helpantoj en la transskribo kaj redaktado de la manuskriptoj estis S-ro Bertram Keightley kaj S-ro Archibald Keightley. *La Sekreta Doktrino*, bazita sur strofoj tradukitaj el la “Sekreta Libro de Dzyan” kun komentoj kaj klarigoj de H.P.B., enhavas la plej ampleksan prezenton de esotera Saĝeco aŭ Teozofio disponebla al la publiko. La preparado de la verko estis malfacilega tasko, ĉar la aŭtorino ne nur havis la respondecon klarigi teozofiajn konceptojn kaj principojn plejeble klare, sed ankaŭ havis la plian taskon montri la ĉeeston de tiu Saĝeco en religio, scienco kaj aliaj kampoj de scio.

Lastaj Tagoj

En 1889 H.P.B. publikigis *The Key to Theosophy* [La Ŝlosilo al Teozofio], “klara ekspozicio, en formo de demandoj kaj respondoj, de la Etiko, Scienco kaj Filozofio, por kies studo la Teozofia Societo estis fondita”, kaj la edifan mistikan gemon titolitan *The Voice of Silence* [La Voĉo de l’ Silento], enhavanta selektitajn eltiraĵojn tradukitajn el orienta Skribo, “La Libro de la Oraj Preceptoj”, libro profunde okulta kaj mistika, kiun ŝi estis lerninta parkere dum sia trejnado en Oriento. La malgranda *The Voice of Silence*, unue eldonita en 1889, alportas la saman metafizikan mesaĝon kiel *La Sekreta Doktrino*. En julio de 1890, H.P.B. establis la eŭropan sidejon de la Teozofia Societo ĉe Avenue Road 19, St. John Wood, Londono. Tie ŝi mortis la 8-an de majo de 1891. Per ŝiaj skribaĵoj kaj instruoj, ŝia vivo kaj karaktero, ŝia misio kaj okultaj povoj, H.P.B. pruvis esti la plej granda moderna okultisto en la historio de la okcidenta civilizacio.

Fontoj:

1. *The Key to Theosophy*, H.P.B., teksto de kovrilo.
2. *The International Theosophical Year Book*, TPH [Teozofia Eldonejo], Adyar, 1938.

3. *The Occult World of Madame Blavatsky*, kompilita kaj redaktita de Daniel H. Caldwell, Impossible Dream Publications, 1991.
4. *H. P. Blavatsky and the Secret Doctrine*, redaktita de Virginia Hanson, A Quest Book, TPH [Teozofia Eldonejo], Usono, 1988.